INFORMA BULTENO

# DE ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA

**JANUARO 1965 MARTO** **8(70)**

## Ĉ E Ĥ O S L O V A K I O   J U B I L E A S

Dudek jaroj estas eta sekundo en la vivo de homaro, sed dudek ĵus pasintaj jaroj estas en samtempa historio de la horaaro kaj de la popoloj granda paŝo antaŭen.

Dudek jaroj en homa vivo eĕtas nur ĝia negranda parto. Statistikuloj kaj ekonomuloj diradas, ke gi prezentas unu generacion.

Unu generacio - tiu nuna, nova - komencas sian plenan vivon. Ĉion ĝi havas je sia dispono. Sed ni ne forgesu, ke komence de tiuj dudek jaroj, de tiu ĉi nova generacio estis ĝia naskiĝo kaj samtempe morto de multaj milionoj - oferoj de la dua mondmilito.

La 9-an de majo 1945 frumatene finiĝis la dua mondmilito, hazarde tie, kie ĝi komenciĝis - en Ĉeĥoslovakio. Malfama konferenco en Munkeno =deklaris= ke ebla milito estis forigita. Sed ne pasis longa trankvila tempo. La milito tamen komenciĝis. Hitler ruinigis Polujon, poste atakis aliajn ŝtatojn kaj fine Sovetunion. . . La milito estis ega kruela kaj fine Germanujo de Hitler estis detruita kaj lastaj ĝiaj regimentoj fermitaj kaj senarmigitaj en Ĉeĥoslovakio. La milito detruis tion, kion dekoj da generacioj konstruadis. De Pireneoj al Moskvo, de Norda Poluscirklo al Saharo, de Hindujo al Japanujo - ankaŭ en Ĉeĥoslovakio.

Dum dudek jaroj manoj de samtempuloj konstruis novan estontecon de nia lando. Okazis multe dum tiuj dudek jaroj. Okazis multe, sed ni deziras, ke estu multe pli, ĉiam pli kaj ĉefe en paco, sen timo de ebla milito, sen sango de oferoj, kiel estis antaŭ tiuj dudek jaroj.

Jaroslav Štěpánek,
portanto de ordeno =Por eminenta laboro=
ĉefredaktoro de Geologický průzkum=

Tradukis -JELĈ-

# DATUMOJ, KIUJN NI NENIAM FORGESOS

**1939** 29.9 en Munkeno subskribis Hitler, Mussolini, Chamberlain kaj Daladier konvencion pri Ĉeĥoslovakio sen Ĉeĥoslovakio. Ĉeĥoslovakio perdis siajn limregionojn.

**1939** 15. 5. Hitler-armeoj ekatakis Bohemon kaj Moravion. El libera ŝtato fariĝis Protektorato. ● 1. 9. Hitler-armeoj ekatakis Polujon. La dua mondmilito komenciĝis en sia plej kruela formo.

**1940** Viktimoj de Hitler-armeoj fariGis:9. 4. Danujo kaj Norvegujo. ● 10. 4. Nederlando. Belgujoj, Luksemburgo. ● 17. 6. kapitulaciis Francujo, ● 8. 8. estis komencita aerbatalo pri Britujo. ● 14. 9. Hitler-armeoj eniris Rumanujon.

**1941** 2. 3. Hitler-armeoj eniris Bulgarujon kaj 6. 4. ekatakis Jugoslavion kaj Grekujon. ● 26. 4. germanaj armeoj sub generalo Rommel transiris egiptajn limojn. ● 22. 6. Hitler-armeoj ekatakis Sovetunion. ● 8. 12. japanaj armeoj ekatakis ŝiphavenon Pearl Harbour. ● 11. 12. Germanujo kaj Italujo proklamis militon kontraŭ Usono.

**1942** 27.5. atentato de anstataŭanta protektoro Heydrich en Praha. ● 10. 6. ekstermo de ĉeĥa vilaĝo Lidice, farita de Gestapo (sekreta polico) kaj germana armeo. Ĉiuj viroj estis mortpafitaj, la virinoj kaj infanoj fortransportitaj en koncontrejon. ● 24. 6. La sama sorto trafis alian ĉeĥan vilaĝon Ležáky. ● 3.11. En Egiptujo komencis returnenmarŝi la germanaj kaj italaj armeoj.

**1943** 30. 1. kapitulacis la 6-a germana armeo en Stalingrado. ● 8. 3. batalo apud Sokolovo (UdSSR), kie batalis ankaŭ ĉeĥoslovakaj taĉmentoj. ● 10. 7. britaj kaj usonaj armeoj elŝipiĝis en Sicilio.

**1944** 8. 4. sovetaj armeoj atingis la ĉeĥoslovakan ŝtatlimon. ● 6. 6. britaj kaj usonaj armeoj elŝipiĝis en Francudo. ● 29. 8. komenciĝis Slovaka nacia ribelio. ● 8. 9. la Unua ĉeĥoslovaka armea korpuso komencis kune kun sovetaj armeoj batalon pri la montpasejo Dukla. ● 6. 10. la Unua ĉeĥoslovaka armea korpuso eniris, tra la mont-pasejo Dukla, Ĉeĥoslovakion.

**1945** En Ĉeĥoslovakio estis liberigitaj la urboj: 20. 1. Košice kaj Prešov. ● 4. 4. Bratislava. ● 29. 4. Brno. ● 30. 4. Ostrava. ● 5.5. komenciĝis popola ribelo en Praha kaj en tuta Bohemio. ● 9. 5. soveta armeo liberigis la ĉefurbon Praha. Tiu ĉi datumo signifas finiĝon de militaj operacioj en Eŭropo.

Nur kelkaj datumoj el tiuj kruelaj jaroj de la dua mondmilito, dum kiu milionoj da homoj perdis sian vivon sur batalkampoj, milionoj estis turmentmortigitaj, milionoj perdis sanon.

Estis neniigitaj nemezureblaj valoroj. Tio signifas, ke nur en Ĉeĥoslovakio estis dum tiuj ses militaj jaroj 360.000 homoj mortigitaj, el ili estis 195.000 turnentmortigitaj en multaj naziismaj koncentrejoj - inter ili estis 2206 infanoj. Por devigaj laboroj estis fortrenitaj 750.000 loĝantoj de Ĉeĥoslovakio.

Tutaj vilaĝoj estis detruitaj ĝis la ternivelo. Kaj tiuj, kiuj kulpas pri tiaj teruraĵoj? Nur kelkaj el ili estis punitaj.


La plej granda parto el ili trankvile vivas.


Ili atendas la datumon de la 8-a de mado 1965, kiam intencas la registaro en Okcidenta Germanujo deklari la militkrimojn kiel valid-limigitaj.

Ni, esperantistoj, protestas, kontraŭ tiu ĉi intenco, kiu signifus, ke ni devus vivi kun milit-krimuloj kaj murdistoj de dekmiloj da niaj samlandanoj.

RED

B R N O
dua plej granda urbo
de Ĉeĥoslovakio -
estis liberigita la 29-an
de aprilo 1945







B R A T I S L A V A
slovaka ĉefurbo -
liberigita la 4-an
de aprilo 1945

K O Š I C E

domo, en kiu estis
la 5-an de aprilo 1945
proklamita la Ŝtata
programo de liberigita
Ĉeĥoslovakio




US U NAS ZVITEZIL

NOVA JARO EN NIA KLUBO

Estas antaŭ ni la nova jaro kaj tio signifas novan laboron. Nunjare ni havos verŝajne sufiĉe da laboro. Ni festos 20-an datrevenon de liberigo de Ĉeĥoslovakio kaj somere efektiviĝos la III-a Tutŝtata Spartakiado.

Precipe la Spartakiado ebligos al ni montri utilecon de Esperanto, montri ĝian praktikan uzon. Kompreneble por tiu ĉi celo ni uzos =Informan Bultenon=. Sed ankaŭ vi povas partopreni en tiu ĉi afero. Vi ĉiuj havas eksterlandajn korespondantojn kaj en via korespondaĵo vi povas atentigi ilin pri niaj sportaj festoj kaj kompreneble ankaŭ inviti ilin por viziti Ĉeĥoslovakion.

Kaj rezulto de tiu agado? Venos eksterlandanoj. La afero ne finiĝos, sed komenciĝos ĝia dua etapo. Ni devas prepari nin helpi al niaj gastoj, montri al ili la urbon, eventuale ankaŭ aliajn partojn de Ĉeĥoslovakio ktp. La eblecoj estas neelĉerpeblaj.

Ankaŭ programoj de nia klubo rilatos al la preparo por akcepto de eksterlandaj gastoj.

Krome en la klubo okazos diversaj prelegoj, kulturaj programoj ktp.

Kursoj de Esperanto daŭrigos kaj aŭtune certe komenciĝos la novaj kaj krome estos eventuale aranĝita kurso por instruistoj de Esperanto.

Tio ĉi estas nur konciza plano de nia kluba laboro. Tiun laboron oni ne povas precize pláni, sed ni kredas, ke la jaro 1965 estos minimume same aukce sa kiel la jaro pasinta.

Ĉu vi dubas? Ne estas eble. La klubo estas ni ĉiuj, la programoj estas por ni, la kluba vivo kaj laboro estas nia plezuro, kaj hobio kun grandsignifa ideo. Tio signifas, ke kiam ni ĉiuj kunlaboros, ni atingos niajn celojn, ni efektivigos niajn planojn kaj tiamaniere ni helpos al la venko de nia afero, al la venko de Esperanto -Lingvo Internacia. J. O.

**ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO-KOMITATO**

En la tagoj la 13-an kaj la 14-an de februaro 1965 kunvenis en Brno nova estraro de ĈEK. Pri la traktadoj informis niajn geklubanojn la 19-an de februaro s-ano Sviták, kiu informis, ke por la jaro 1965 estis en ĈEK nomitaj kiel membroj:

s-ano SVITÁK /EK-Praba/ - prezidanto
s-ano BALDA /EK-Praha/ - sekretario
s-anino CÍCHOVÁ /EK-Praba/
s-ano HRUŠKA /EK-Ústí nad Labem/
s-ano HRŠEL /EK-Hradec Králové/
s-ano D-ro ŠIKULA /EK-Brno/
s-ano KOČVARA /EK-Ostrava/
s-ano ČAMBÁL /EK-Martin/, vicprezid.
s-ano LEHOTSKÝ /EK-Bratislava/
s-ano KUCÍN /EK-Košice/

EKP konfidas al la nova estraro de CEK kaj subtenos ĝian poresperantist-an laboron.

EKP

LA ŜTATA TEATRO POPULARA EL ŁÓDŽ

prezentos la 25-an de aprilo 1965 je la 15-a horo en la teatro de S. K. Neumann, Praba-Libeň, Rudé armády 34
teatraĵon de Shimon Wincelberg
**Kataki signifas malamiko**
dramo en du aktoj
Esperantigis. . . . . . . Tadeuzs Markowski
Jerzy Uspienski
Reĝisoras . . . . . . . . . Roman Sykała
Muzikestras . . . . . . . Bogdan Pawlowski
Informojn: Obvodní kulturní dům ONV-1, Praba 1, Štěpánská 61, telefono: 22-91-51

Okaze de la Internacia virina tago ni gratulas al ĉiuj samideaninoj kaj deziras al ili plenan sanon kaj laborsukcesojn.

EKP kaj RED

Interparolo de nia redaktoro s-ano Vladimír Pražák kun k-adino Eva Bémová membrino de Ĉeĥoslovaka Unio Korpeduka, okazinta la 5-an de februaro 1965

# LA III-a TUTŜTATA SPARTAKIADO

*"Ĉi -jara Spartakiado en Ĉeĥoslovakio estas en la vico jam la tria. Kiom da gegimnastoj aktive partoprenis la Unuan kaj la Duan, kaj kiom da ili gimnastos dum la Tria Spartakiado?"*

"Tion oni povas respondi multvorte. Eble ni parolu koncize pri nombroj. Dum la Unua Spartakiado gimnastis en distriktoj 755.000 lernantoj, gejunuloj kaj ceteraj anoj de memvolaj sportaj organizaĵoj. En regionaj spartakiadoj alternis 390.000 gegimnastoj kaj en Praha poste prezentis sin 560.000 el la plej bonaj. En la Dua Spartakiado kunligis la libervolaj sportaj organizaĵoj en Ĉeĥoslovakan Union Korpedukan. En la jaro 1960 dum la distriktaj spartakiadoj estis sur pli ol 300 stadionoj 1,149.879 gegimnastoj. En la regionaj spartakiadoj estis 847.923 kaj poste sur Strahov-stadiono gimnastis 721.603 reprezentantoj de ĈUK /ČSTV/. Parolante pri la Tri, a Spartakiado mi povas diri, ke laŭ la lastaj informoj preparas sin 1,170.000 gegimnastoj kgj sur Strahov-stadiono ni renkontiĝos kun 160.000 el tiuj la plej bonaj."

*"Kompare kun la lastaj du Tutŝtataj Spartakiadoj ŝajnas al mi, ke nombro de gimnastoj sur Strahov-stadiono estas malalta. Ĉu tio antaŭsciigas ŝanĝon en koncepto de ĉeĥoslovakaj spartakiadoj?"*


"Vi pravas. Ĉeĥoslovaka korpa edukado havas pli ol 100-jaran tradicion de publikaj amasaj sportaj prezentadoj. Ambaŭ spartakiadoj estis organizitaj lau tiu ĉi tradicia ideo. La Tria Tutŝtata Spartakiado signifos revolucian ŝanĝon. Estas certe, ke en la mondo oni favore taksas la ĉeĥoslovakajn spartakiadojn.

Oni konsideras ilin kiel kontrolo de maturiĝo kaj saneco de la popolo. Laŭ nia modelo komencas aranĝi tiajn grandajn naciajn manifestaciojn Pollando, Rumanio, Bulgario, denove Svislando, Germana Demokratia Respubliko kaj Germana Federacia Respubliko, kun amasaj sportaj komponaĵoj anoncas sin Japanujo kaj ankaŭ Usono kaj Francujo preparas similajn spektaklojn. Ni ne volas perdi la unuan lokon kaj tial krom la amasaj prezentadoj, kiuj kompare kun la lastaj estas fiziologie tre penaj kaj enmetitaj en programon, kiu havas unuigan ideon, ni arangos eĉ konkurojn je la plej bona sportisto de ĈSSR. Dum finalo sur Strahov-stadiono kuniros preskaŭ 5.000 konkurantoj. Ankaŭ turismo apartenas al korpa edukado kaj sporto. Konkuraj marŝadoj laŭ turismaj signoj, marŝadoj kun uzado de kompasoj, aranĝo de daŭremaj turismaj staciejoj, per tio volas turisma fako kontribui al sukceso de la Tria Tutŝtata Spartakiado. Oni povas kalkuli kun tio, ke en la kadro de la Tria Tutŝtata Spartakiado festos la 20-an datrevenon de liberigo de Ĉeĥoslovakio pli ol 2,000.000 anoj de korpedukado kaj sporto. Ekzemple en Nordmoravia regiono preparas sin por Spartakiado ĉiu oka homo. Se ni alkalkulos sportistojn kaj turistojn, tio signifas, ke ĉiu kvina homo partoprenas tiun ĉi grandiozan movadon."

*"Ĉu vi povas diri al mi, kiamaniere oni en Praha aranĝos akcepton de tiu granda amaso da homoj el la tuta respubliko kaj eĉ de ĉiuj eksterlandaj partoprenantoj?"*

"En nian ĉefurbon alvenos 160.000 gegimnastoj kaj la nombron 200.000 kompletigos sportistoj kaj turistoj el membraro de Ĉeĥoslovaka Unio Korpeduka kaj partoprenantoj de "Vesperoj de amikeco".

Tiuj ĉi estos loĝigotaj en lernejoj kaj en tendaroj. Eksterordinaraj trajnoj alveturigos vizitantojn el ĉiuj lokoj de la respubliko, ĉar oni kalkulas, ke dum la kvar posttagmezaj prezentadoj alternos preskaŭ unu miliono da vizitantoj. Tial en Praha oni rapide plimultigas loĝeblecojn. Intereso el eksterlando estas tre granda kaj la nombro 9.000 el la Dua Tutŝtata Spartakiado estos certe plialtigita. Ĝis hodiaŭ anoncis sin multnombraj grupoj el Usono, Japanujo, Francujo, GFR, Anglujo, Svislando, Svedujo kaj eĉ el Aŭstralio kaj Novzelando. Eksterlandaj vizitantoj ricevos vizojn rekte sur limoj. Estas kompreneble, ke kromordinara intereso pri la Tria Tutŝtata Spartakiado estas eĉ en Sovetunio kaj en la ceteraj socialismaj landoj. Al ĉiuj vizitantoj ni promesas, ke ili ekvidos perfektan spektaklon de kulture kaj korpe maturiĝaj nacioj el mezo de Eŭropo. Ĝis la revido en julio 1965."



# KULTURA CENTRO DE PRAHA

En la nordokcidenta parto de Praha situas la plej granda kulturrefreŝiga centro portanta la nomon de ĉeĥa nacia heroo Julius Fučík, mortigita en la jaro 1944 de naziistoj. La nomo ne estas hazarde elektita. En sia lasta verko, mondkonata =Raportaĵo de sub la pendigilo=, kiu estas testamento de Fučík al ĉeĥa kaj slovaka popoloj, li skribas: "Ni vivis por ĝojo, por ĝojo ni iris batali kaj por ĝi ni mortas. Tial funebro ne estu ligita kun nia nomo."

La Parko de kulturo kaj ripozo estas loko de ĝojdonaj solenaĵoj, spektakloj, sportoj kaj ludoj. Finkonstruita ĝi estis en la jaro 1953 surloke de estinta ekspoziciejo kaj en la spaco de Reĝa ĉasparko. Dum 10 jaroj de ĝia ekzisto vizitis ĝin proksimume 15 milionoj da vizitantoj.

La Parko de kulturo kaj ripozo konsistas el du partoj: la spaco de 100 hektaroj de la Reĝa ĉasparko servas por trankviliga refreŝigo kaj 10 hektaroj de barilita areo estas ekipita por ĉiuspeca popola amuzo. Reĝa ĉasparko estas malnova historia parko, pri kies ekzisto ni trovas unuajn rimarkojn jam en dokumentoj el la 13-a jarcento. En unu tia, kiu portas la sigelon de episkopo Eberhardt oni sciigas al la duko de Bavario Leo Heinrich, ke Reĝa parko apud Praha apartenas al la plej riĉaj ĉasejoj de tuta Meza Eŭropo. En la dokumento de 1319 oni rakontas pri famaj kavaliraj ludoj de vaste konata ĉeĥa reĝo Johano Luxemburgo, kiuj estis en la parko aranĝataj. La Reĝan parkon speciale beligis imperiestro Rudolfo la Dua, kiu en la parko aranĝis komplekson de lagoj kaj ĉirkaŭ ili buntajn vivariojn kaj terariojn. Samtempe oni konstruis tie renesancan somerkastelon, hodiaŭ servanta kiel ĵurnalista muzeo.

En 1680 por la bezono de imperiestro kaj de liaj ĉassocietoj oni konstruis tie negrandan barokan kastelon, hodiaŭ somerrestoracio.

Fine de la 18-a jarcento, kiam en Vieno estis malfermita Prater, ankaŭ la Reĝa parko estis malfermita por publiko. En la jaro 1788 oni aranĝis en ĝi grandan popolfeston dum kiu funkciis multaj dancejoj kun bufedoj, estis prezentitaj pluraj kamparanaj edziĝfestoj kaj aliaj atraktaĵoj.

Surloke de nune barilita areo oni aranĝis nombrajn ekspoziciojn. En 1854 tie estis unua terkultura ekspozicio, dum sinsekvaj jaroj plurfoje ripetata. En 1891 oni aranĝis Landan jubilean ekspozicion, poste Ĉeĥoslavan popolan ekspozicion, kiun sekvis ekspozicio de arkitekturo kaj inĝeniereco kaj de 1920 la ekspoziciejo servis kiel parto de Praga Specimena Foiro.

Disvolvo de industrio kaj de tekniko respeguliĝis ankaŭ tie pere de kelkaj atraktaĵoj. En 1788 estis tie lanĉita unua balono, en 1815 tie oni funkciigis unuan vaporveturilon de ĉeĥa esploristo Josef Božek kaj en 1817 sur la alestanta parto de Vltava /rivero/ oni prezentis navigadon de unua vaporŝipo.

Reĝa parko estas nun belege park-aranĝita kun nombraj lagetoj kaj fontanoj. Ĝiaj kreskaĵoj konsistas el aĝaj raraj arboj kaj ampleksa rosario.

En la barilita spaco la centron formas Kongresa palaco, el estinta Industria palaco per grandaj adaptaj artlaboroj rekonstruita. Temas pri komplekso de tri grandaj salonoj. La meza estas uzata kiel Kongresa salono, en kiu regule estadas kongresoj, internaciaj konferencoj, ekz. medicinaj, sciencaj k. a. Ceteraj du salonoj estas uzataj por teatraj aranĝoj, koncertoj, sed ankaŭ por grandaj baloj. La salonon en la maldekstra parto tutjare uzas junularo, kiu tie kunvenadas dum regulaj senalkoholaj teodancoj. Ĝi estas la plej granda dancsalono por 2000 dancemuloj. La enirtereno de la Parko de kulturo kaj ripozo estas riĉe flor- kaj fontanekipita kaj beligita. Tuj ĉe la enirejo en secesa pavilono estas lokigita lapidario de Nacia muzeo, en kiu estas raraj originalaj barokplastikoj, ekz. statuoj de la ponto de Karolo la Kvara.

En areo de la Parko oni konstruis ankaŭ sportejojn por volejbalo, basketbalo, ludejon por infanfutbalo kaj halon por tabloteniso. Ĉiujn ĉi sport-aranĝojn eluzas laboruloj de diversaj uzinoj samkiel junularo.

Infanoj kaj junularo estas grave atentita de la Parko. Al ili servas specialaj du infananguloj kun plej diversaj porinfanaj aranĝoj. Al ili servas ankaŭ Malgranda sceno kun regulaj filmprezentadoj, diversaj teatraj, varieteaj kaj pupteatraj prezentadoj, kie ankaŭ junaj talentoj povas konkuradi en kantado kaj recitado. Por grandaj spektakloj servas Granda sceno por 6000 spektantoj. El plej belaj lokoj estas Granda fontano, super kiu estas konstruita podio por regulaj prezentadoj, koncertoj kaj modelrevuoj.

Daŭra parto de la Parko estas ankaŭ lunaparko kun karuseloj, balanc-luliloj, rusaj radoj kaj aliaj amuz-atraktaĵoj.

En la Parko estas ankaŭ konstruita unu el tri cirkoramoj en la mondo. Tiu ĉi panorama kinejo vekas daŭran intereson de publiko en- kaj ekster-landa. Granda intereso estas ankaŭ pri panorama bildo de la batalo ĉe Lipany - batalo el husitanaj militoj de 15-a jarcento, pentrita de ĉeĥa pentristo Luděk Marold.

La Parko de kulturo kaj ripozo estas ankaŭ riĉe provizita per restoracioj, vendstandoj kun refreŝigeblecoj kaj multaj malgrandaj bufedoj. Sur multaj kilometroj da vojoj kaj vojetoj estas dissemitaj oftaj sidbenkoj, ripozanguloj kaj similaj.



Sur la teritorio de la Parko estis rekonstruita ankaŭ la ĉeĥoslovaka pavilono, kiu dum la Mondekspozicio en Bruselo 1958 estis premiita per Ora Stelo. En ĝi nun oni aranĝas ekspoziciojn el ĉiuj sferoj de la vivo en nia respubliko. En la Parko estis ankaŭ konstruita Sporthalo kun 16.000 plejparte sidlokoj, kie krom sport-aranĝoj okazadas grandaj glacirevuoj. La Sporthalo estis ankaŭ aranĝloko de pluraj internaciaj sportkonkursoj, ekz. de Mondĉampioneco en belglitkurado.

En la Parko de kulturo kaj ripozo troviĝas ankaŭ granda planetario kun Zeiss-aparaturo, finkonstruita en la jaro 1960. Pli ol unu miliono da vizitantoj, ĉefe el lernejoj, eluzas ĝin por reala astronomia instruado.

Laboruloj de Praha vizitas la Parkon tutsemajne. Tamen plej multaj vizitantoj venadas dimanĉe kaj festotage, kiam estas organizitaj popolfestenoj kaj amuzaranĝoj. El plej grandaj estas en septembro Tago de preso, kiam dum dimanĉo la Parko bonvenigas pli ol 100,000 vizitantojn.

Speciale dum somera sezono vizitas la Parkon multaj fremduloj. Venadas ankaŭ multaj geamikoj esperantistaj. Tial la Parko en kunlaboro kun Esperantista klubo en Praha intencas malfermi esperantistan informservon kaj ĉiujn geesperantistojn kaj iliajn geamikojn kore bonvenigas.

Tradukis JELČ

Miloslav Macháček,
direktoro de PKOJP

# ESPERANTO-MOVADO EN ĈEĤOSLOVAKA FERVOJA TRAFIKO SUKCESE KRESKAS

Kia paradokso por la homaro, ke ĝi ne povas reciproke interkompreniĝi pro multaj lingvoj kaj dialektoj. La mondo estas vere kiel Babilona turo. Kaj tamen la popoloj povus facile interkompreniĝi, sen granda perdo da tempo pro lernado, se ili uzus la simplan internacian lingvon Esperanton. Por amika kaj simpla interkompreno per Esperanto en Eŭropo kaj en la tuta mondo klopodas fervojistoj. Pro tio ili fondis antaŭ 17 jaroj IFEF /Internacia Fervojista Esperanto-Federacio/, kies prezidanto estas s-ano K. G. J. de Jong en Amsterodamo. =LA RELOJ KUNLIGAS LA LANDOJN - ESPERANTO LA POPOLOJN=, ĝi estas la devizo de la nomita Federacio. Pri ĝia signifo mi konvinkiĝis dum la IFEF-Kongreso en Budapeŝto en la jaro 1962 rilate al la internacia amikeco kaj kunlaboro inter la fervojistoj-esperantistoj.

Mi povas ĝoje diri: en Hungarujo mi konsciis kun kolegoj Hiža, Řebíček kaj Suchý, ke estas necese fondi Sekcion de niaj fervojistoj - esperantistoj, Tiam ni povis partopreni la IFEF-Kongreson kiel gastoj, dank' al la afabla invito de la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio. La ĉefprotektanto de la Kongreso estis la hungara ministro por trafiko, esperantisto, k-do Stefano Kossa. Dum la Kongreso ni travivls neforgeseblajn impresojn pri esperantista amikeco. Kun ĝojo ni rememoras ĉiujn gekongresanojn kaj salutas ilin sincere! Por informo estos bone mencii pri la evoluo de fervojista E-movado en Ĉeĥoslovakio. Post nia reveno el Hungarujo mi kaj la nomitaj kolegoj skribis interesan raporton pri la sukcesa kaj impona Kongreso de IFEP en Budapesto al Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato /ĈEK/, kiu komisiis min labori laŭ mia iniciativo por fondi fervojistan E-rondeton en Praha kaj ke mi organizu Landan fervojistan Sekcion laŭ nia propono. Mi eksciis, ke funkcias fervojistaj E-rondetoj en urboj Havlíčkův Brod, Česká Třebová kaj en Olomouc, kun kiuj mi komencis kunlabori kaj kiuj al mi laŭeble helpis. Miaj kolegoj ne estas okupataj en Praha kaj pro tio mi ne havis ĉi tie kunhelpantojn, sed mi havis entuziasmon. Por iaj malfacilaĵoj en la jaro 1963 la tempo kaj feliĉo estis tamen favoraj por mi en persista pionira laboro kaj dum unu jaro mi varbis en Praha pli ol 50 interesulojn, kiuj decidiĝis lerni Esperanton aŭ en ĝi perfektiĝi. Dum aŭtuno 1964, dank' al la kompreno /post mia klarigo/ kaj intereso pri Esperanto de la gravaj funkciuloj en ministerio por trafiko, kie mi estas okupata, mi sukcesis fondi en Praha Fervojistan Esperanto-rondeton ĉe sindikata komitato de nomita ministerio. Ni havas bonan kunlaboron kun Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato kaj kun Esperantista klubo en Praha. Mi sukcesis ankaŭ aranĝi la kurson, kie mi instruas Esperanton. Preskaŭ 40 fervojistoj el Praha vizitas ĝin. En kelkaj urboj oni aranĝas ankaŭ E-kursojn por fervojistoj.

Dum 8 monatoj mi konstatis aŭ varbis letere en diversaj urboj /precipe en stacidomoj/ entute 230 E-fervojistoj. Sekve de tiu sukceso ni povis postuli la fondigon de Landa Fervojista Sekcio ĉe la ĈEK. La Sekcio estis fondita la 13-an de januaro 1965 dank' al kompreno de funkciuloj de ĈEK (sekretario s-ano Sviták) kaj en Osvětový ústav (Kleriga Instituto), kiuj nomis min kiel prezidanton de la Sekcio. Dankon al ĉiuj membroj, kiuj aliĝis persone aŭ letere al nia Fervojista Sekcio, dankon pro ilia fido kaj entuziasmo por nia E-movado. Baldaŭ ni sendos al ĉiuj anoj cirkuleron pri organizo kaj laboro de nia nova Sekcio. Nia Landa Fervojista Sekcio fariĝos baldaŭ membro de IFEP.

Nuntempe estas en Ĉeĥoslovakio 10 fervojistaj E-rondetoj, kiuj klopodas pri bona reciproka kunlaboro. Ni alvokas esperantistojn en nia trafiko, kiuj ankoraŭ ne aliĝis al nia E-movado, por ke ili sendu sian adreson al Ĉeĥoslovaka Esperanto - Komitato, Fervojista Sekcio, Praha 2, Blanická 4.


Ĉeĥoslovakaj fervojistoj-esperantistoj salutas samideanojn en la tuta mondo kaj deziras kunlabori. Pri sukcesa agado de niaj E-fervojistoj skribis organo de IFEF =LA INTERNACIA FERVOJISTO=. Nia Sekcio dankas al IFEF pro ĝia favoro, helpo kaj deziro, kiun ni sincere reciprokas. Dankon al IFEF-sekcioj, kiuj skribis al ni kaj helpas al nia bona afero.

La 17-a IFEF-Kongreso okazos de la 22-a ĝis la 28-a de majo 1965 en Hamar (Norvegujo). La distanco inter Oslo-Hamar mezuras 126 kilometrojn kaj la vojaĝo daŭras 2 horojn. Korespondadreso: IFEF-Kongreso, poŝtkesto 61, Loten, Norvegujo. Kun simpatioj kaj kompreno ni legis pri la propono de la hungaraj esperantistoj-fervojistoj uzadi Esperanton en la limstacioj de la diversaj ŝtatoj por deĵoraj aferoj, por ke ne estiĝu miskomprenoj! Ni rekomendas la hungaran proponon en ĝia lando. Kompreneble ĝi signifas, ke ĉiuj laborantoj en internacia trafiko eklernu Esperanton. Kun intereso ni legis ankaŭ pri la propono de la Svisa Fervojista Sindikato uzadi Esperanton en internacia trafiko. Ni simpatias kun la propono, kiun ni subtenas.

Por fervojistoj ekzistas Internacia Ligo por kontraŭbatali alkoholon en nuntempa granda kaj rapida trafiko. La Ligo havas ĉirkaŭ 75.000 membrojn en eŭropaj landoj. Ni simpatias kun la propono de la finnaj, svedaj, norvegaj kaj danaj societoj de la nomita Ligo, ke ankaŭ la internacia lingvo ESPERANTO ESTU UNU EL LA OFICIALAJ LINGVOJ (krom la germana, franca kaj angla) en internaciaj kunvenoj.

Dum la internacia kunveno de fervojistoj radio-amatoroj en Hamburgo (septembro 1964) proponis prezidanto de la Germana Esperanta Fervojista Asocio s-ano Giessner uzadi Esperanton ne nur por internaciaj konferencoj, sed ankaŭ por la tuta radio-sendado (ĝis nun estas la germana, franca kaj itala kiel oficialaj lingvoj). Ni deziras sukceson tiurilate.

Bohumil Král, Praha



# EL NIAJ GAZETOJ PRI ESPERANTO

Proletáři všech zemí, spojte se!

**RUDÉ PRÁVO**

ORGÁN ÚSTŘEDNÍHO VÝBORU KOMUNISTICKÉ STRANY ČESKOSLOVENSKA

la ĉefa taga gazeto aperigis la 21-an de januaro 1965 koncizan sciigon pri Esperanto en Ĉeĥoslovaka fervoja trafiko, en kiu estis substrekita, ke "Esperanto plifaciligos al niaj fervojistoj kunlaboradon, praktikan kontakton kaj interŝanĝon de spertoj kun fervojistoj el fremdaj landoj. Niaj fervojistoj marŝas en la sama vico kune kun ceteraj landoj, precipe kun tiuj, pli malgrandaj, kiuj postulas Esperanton kiel deĵoran lingvon por laborantoj en internacia trafiko."

La 12-an de februaro 1965 sur la 2-a paĝo en la sama gazeto aperis artikolo sub la titolo =INVITILOJ AL SPARTAKIADO=. La artikolo sciigas legantojn pri la enhavo de tiu ĉi numero de =I. B. =, pri helpo de niaj esperantistoj en ĉiuj aranĝoj, kiuj okazos en kadro de la 20-a datreveno de liberigo de Ĉeĥoslovakio kaj de la III-a Tutŝtata Spartakiado. Krome estas en la artikolo mencio pri la ENKETO de =I. B. = por eksterlandaj esperantistoj kaj pri la aldonaĵo al =I. B. =, kiu servos por eksterlandaj korespondantoj kiel propagandilo de nia respubliko.

Pri la 17-a IFEF-Kongreso en Hamar, Norvegujo, skribas la gazeto RUDÉ PRÁVO la 10-an de marto 1965 sur la 2-a paĝo. Krome estas en la artikolo mencio pri la Eŭropa Esperanto-Konferenco en Vieno, okazonta en julio 1965 kaj pri la 50-a Universala Kongreso en Tokio.


**List všech Pražanů**

## Večerní Praha

la 20-an de januaro 1965 presigis artikoleton sub la titolo: =En la klubo de esperantistoj= En ĝi oni skribis inter alie:

. . . "Antaŭ nelonge vojaĝis en Azerbejdĵano niaj artistoj, kiuj tie prezentis sian arton. Kelkaj el ili venis poste en E-klubon en Praha, por ke ili transdonu siajn impresojn al la aŭskultantoj. Membro de la nomita klubo, d-ro Pravoslav Sádlo-Páv, kompletigis sian rakontadon per koloraj diapozitivoj. Nacia artistino Jarmila Glazarová, kiu ĉeestis kiel gasto, interese rakontis pri la vojag-travivaĵoj kaj pri la vivo en tiu ĉi parto de Sovetunio. . . "

Denove skribis tiu ĉi gazeto pri Esperanto en nia ĉefurbo la 20-an de februaro 1965. En mallonga artikolo oni sciigas kiom da eksterlandaj esperantistoj vizitis la ĉefurbon dum la pasinta jaro.



Samideano Jonas en amika interparolo kun reprezentantoj de nia klubo

# EMINENTA VIZITO EN PRAHA

En la tagoj de la 18-a ĝis la 22-a de februaro 1965 vizitis Ĉeĥoslovakion la ĉefurbestro de Vieno, sinjoro Franz JONAS, entuziasma esperantisto, membro de honora komitato de la Eŭropa Esperanto-Konferenco, okazonta en julio 1965 en Vieno.

Kompreneble, ke sinjoron Jonas volis viziti delegacio de nia klubo. Bedaŭrinde, kiel ni en la lasta momento estis informitaj, estis la kvintaga oficiala vizito de sinjoro Jonas tiel riĉe programita, ke por akcepto de nia delegacio oni ne povis trovi eĉ kelkajn minutojn da libera tempo. Sed venis surprizo. Sinjoro Jonas ne forgesis siajn longjarajn amikojn kaj tial nia prezidanto, lia edzino kaj nia sekretario ricevis de aŭstra ambasadoro en Praha, sinjoro d-ro Calice, invitilojn por partopreni festenon, okazantan honore al sinjoro Jonas en aŭstra ambasadorejo.

Tiel okazis, ke la 19-an de februaro 1965 oni povis en aŭstra ambasadorejo en Praha aŭdi krom la germana, ĉeĥa, angla kaj franca lingvoj, ankaŭ Esperanton.

En ĉeesto de aŭstra ambasadoro niaj reprezentantoj transdonis al samideano Jonas klubajn kaj personajn donacojn kaj salutadreson.

Samideano F. Jonas interesiĝis pri nia kluba vivo kaj pri E-movado en Ĉeĥoslovakio. Lia perfekta Esperanto estis admirinda kaj lia intereso kora. Post la festeno, kiun partoprenis ankaŭ ĉeĥoslovaka ministro por eksterlandaj aferoj, ĉefurbestro de Praha, membroj de diplomataro kaj reprezentantoj de ĉeĥoslovaka kultura vivo, diris samideano Franz Jonas por nia mikrofono:

"Estis por mi granda surprizo, ke mi hodiaŭ renkontis miajn Esperanto-amikojn. La surprizo estas tiom pli granda, ĉar mi unue esperis renkontiĝi kun esperantistoj ĉi tie, sed mia programo estas tiom tensia kaj tiom intenziva, ke mi ne povis esperi je efektiviĝo de miaj deziroj. Sed des pli feliĉa mi estas nun. Mi aŭdis, ke la esperantistoj de Praha hodiaŭ vespere havas kunvenon, do mi uzas la okazon transdoni al la esperantistoj miajn plej korajn salutojn. Mi scias, ke la laboro por Esperanto ne estas facila kaj tial mi deziras al vi plej grandajn sukcesojn kaj mi petas vin, daŭrigu viajn penigojn, viajn penojn kaj vian laboron por gajni novajn amikojn por la esperantista movado. Mi deziras al vi plenan sukceson."

Niaj reprezentantoj dankis al samideano Jonas por lia saluto kaj deziris al li belan tempopasigon en Ĉeĥoslovakio kaj petis lin, ke li transdonu al aŭstraj gesamideanoj varmajn kaj amikajn salutojn de ĉeĥoslovakaj esperantistoj.

RED

# Nia enketo por eksterlandaj legantoj

Karaj amikoj,

ni preparis por vi kvin demandojn kaj per ilia respondo vi fariĝos partoprenantoj de ENKETO, kiun por vi preparis Parko de kulturo kaj ripozo de Julius Fučík kune kun Esperantista klubo en Praha.

1. Kion vi scias pri ĈEĤOSLOVAKIO?

2. Ĉu vi jam estis en ĈEĤOSLOVAKIO kaj kio plaĉis tie al vi?

3. Ĉu vi intencas vojaĝi al ĈEĤOSLOVAKIO kaj kiam?

4. Kio interesas vin en ĈEĤOSLOVAKIO?

5. Pri kio vi ŝate legus en =INFORMA BULTENO=?

Viajn respondojn sendu al ni ĝis la 30-a de septembro 1965 je la adreso: =ESPERANTO=, P. B. 1108, Praha, Ĉeĥoslovakio.

Al la respondoj estas necese aldoni kuponon, presitan sur la paĝoj 15 kaj 16 en tiu ĉi numero de =I. B. =. Se la partoprenanto de la ENKETO ne estas abonanto de =I. B. = kaj se li tamen volas partopreni nian ENKETON, li anstataŭigu la kuponon per sendo de du ekzempleroj de E-gazetoj, aperantaj en lia lando aŭ per 2 respondkuponoj. Li povas ankaŭ abonpagi nian =I. B. =.

Tiam li sendu je nia adreso 1$ aŭ egalvaloron. La ENKETON povas partopreni ankaŭ via klubo kiel kolektivo.

Al tiuj partoprenantoj de nia ENKETO, kiuj intencas en la jaro 1965 viziti Ĉeĥoslovakion, estos post ilia veno en Pragon la kupono stampita kaj ŝangita je senpaga enirbileto en Parkon de kulturo kaj ripozo por iu ajn tago en tempo de 15-a de aprilo ĝis la 31-a de decembro 1965. Ni rekomendas al vi, ke vi anoncu ĝustatempe vian alvenon, por ke ni povu vin atendi.

Ni ĝojas je viaj respondoj kaj la rezulton ni anoncos en ĉi-jara lasta numero de =I. B. =.

La redakciojn de eksterlandaj gazetoj ni petas, ke ili represigu anoncon pri nia ENKETO kaj pri la sendo de redakcia specimeno de =I. B. =.

## EN NIAN NOTLIBRON ENSKRIBIS:

JARMILA GLAZAROVÁ, nacia artistino, Praha:

En amika rondo de esperantistoj mi denove travivis ekskurson en Azerbejdĵanon kaj aŭskultis rakontadon en la lingvo Esperanto, kiu estas belsona, komprenebla kaj kiu estas helpilo de interkompreno inter popoloj. Mi dankas kaj mi deziras prosperon k. sukceson.

KHO-KHWAT-LIAT, Djakarta, Indonezio:

Agrabla estis la kunveno, kiun mi partoprenis en la Esperanto-klubo en Praha. Mi salutas kore la ĉeĥoslovakajn esperantistojn kaj deziras al ili multajn sukcesojn en ilia poresperanta laboro.

FRANZ JONAS, ĉefurbestro de Vieno, Aŭstrujo:

Nur por kelkaj tagoj mi povas resti en Praha. Kaj tial mi ege bedaŭras, ke mankis la tempo viziti la Esperanto-klubon. Dankon, ke vi tamen salutis min tiom amikece! Ne perdu la paciencon por la laboro internacia per Esperanto! Multe da sukceso en via klopodoj gajnu multajn adeptojn de Esperanto .

RED

ENKETO DE =INFORMA BULTENO=

Nomo . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Adreso . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

. . . . . . . . . . . . . lando . . . . . . . . . . .

Profesio . . . . . . . . . . . . . aĝo . . . . .

Esperantisto ek de la jaro . . . . . . . . .

---

LA 2-a INTERNACIA SEMINARIO ĈE NIGRA MARO

Bulgara Esperanto-Junularo organizos en tagoj de la 20-a ĝis la 31-a de julio 1965 DUAN INTERNACIAN SEMINARION - FERIOSEMAJNON en la internacia junulara tendaro en Primorsk ĉe Nigra maro. La Seminario okazos ĉi-jare en la kadro de la internacia kampanjoj=1965 - Jaro de internacia kunlaborado=, laŭ la propono de Unuiĝintaj Nacioj.

Aliĝado estas ebla nur pere de Centra Komitato de Ĉeĥoslovaka Junularo (Ústřední výbor československé mládeže), Praha 3, nám. Maximy Gorkého 24, en kadro de kutima interŝanĝo kun Bulgara Junulara Organizaĵo aŭ surbaze de speciala interkonsento.

Eluzu tiun ĉi eblecon, travivi belan libertempon inter la gesamideanoj!

J. O.

---

## *Ukrajina popola kolektivo de kantoj*

prezentis sian arton en kulturaj programoj de Esperantista klubo en Praha, aŭtune 1964.



Ukraina popola kolektivo de kantoj kun sia ĥorestro k-ado Ŝ. Ŝutko

S E N P A G A   E N I R B I L E T O

por eksterlanda esperantisto, kiu vizitos la Parkon de kulturo kaj ripozo de Julius Fučík. Tiu ĉi enirbileto validas en tagoj de

. . . . . . . . . . . . . . . . . .

La vizitanto partoprenis la enketon de =1. 3. =

/Stampilo de la klubo/

Stampilo de PKOJP/

---

Nian dankon ni adresas al samideano Josef VÍTEK, Mělník, kiu ofereme kunlaboris dum preparaj laboroj por eldono de tiu ĉi numero de =I. B. =.
La redakcio

La redakcio pardonpetas ĉiujn korespondantojn, kies kontribuaĵoj el la jaro 1964 ne estis ĝis nun represitaj, ĉar la lingva korektisto ne redonis ilin al ni.
RED

Ĉeĥoslovaka faka revuo =GEOLOGIA ESPLORADO= serĉas eksterlandajn korespondantojn (eĉ neesperantistojn) el fakoj: geologio, arkeologio, inĝenieraj konstruaĵoj kaj paleontologio. Skribu al la adreso: Redakcio de =Geologický průzkum= /=Geologia esplorado=/, Malostranské nám. 19, Praha 1, Ĉeĥoslovakio.
LA PARKO DE KULTURO KAJ RIPOZO DE JULIUS FUČÍK intencas plivastigi aranĝojn de popola amuzado. Ĝi interesiĝas tial pri ĉiuj prospektoj de diversspecaj ludaŭtomatoj kaj lunaparkaj atraktaĵoj. Se vi povas akiri similajn materialojn, sendu ilin laŭ la adreso: Parko de kulturo kaj ripozo de Julius Fučík, Praha 7.

## KORESPONDI DEZIRAS

ĈEĤOSLOVAKIO:
= JANA ONDRÁČKOVÁ, Bubenská 17, Praha 7, ČSSR, deziras ŝanĝi tutmonde fromaĝ-etiketojn. Al ĉiuj kolektantoj certe respondos.
H U N G A R U J O:
= ILONKA kaj JUTKA KOVÁČ /patrino kaj filino/, Voros Október 48, Gyor, Hungarujo, deziras korespondi.
SOVETU NI O:
= ANATOLIO DOVBIŜ, Ŝostka, Sumskaj obl. Korolenko 43-3» Ukraina, USSR.
= FIDERIK BATRAK, Ŝostka, Sumskaj obl. , Privokzalnaja 13-10. Ukraina, USSR.
MULTOBLIGITAJ ANONCOJ pri la teatraĵo =Kataki= -estis dissenditaj pere de OKD-1 sen scio de EKP. Tial EKP ne respondas pri la indikitaj prezoj de enirbiletoj kaj pri la preseraroj. La teatro de S. K. Neumann informis nin, ke la prezoj de la enirbiletoj estas de 7, - ĝis 13, - Kčs. EKP

=INFOEMA BULTENO- de Esperantista klubo en Praha - fakrondeto de Obvodní kulturní dům ONV 1, Ir aha 1. Redakcio: kolektivo de laborantoj de OKD-1.
Teknika redakcio: Vladimír Pražák. Lingva redakcio: Antonín Slanina. Aperas laŭbezone: Adreso: =ESPERANTO =, P. B. 1108, Praha 1, Ĉeĥoslovakio

17.5.1965